

Festu kun ni

la Eŭropan Tagon de Lingvoj

je la 26a de septembro!

Kio estas la Eŭropa Tago de Lingvoj (ETL)?

Ĝi estas tago por festi la eŭropan plurlingvecon kaj stimuli lingvolernadon.

Laŭ iniciato de la Konsilio de Eŭropo en Strasburgo oni ekde 2001 festas ĉiujare la Eŭropan Tagon de Lingvoj je la 26a de septembro.

Kial ni festas la ETL-on?

- Por konsciigi homojn pri la graveco de lingvolernado por la kreskigo de plurlingveco kaj interkultura interkompreniĝo
- Por diskonigi la riĉan lingvistikan kaj kulturen diversecon de Eŭropo
- Por stimuli dumvivan lingvolernadon en- kaj eksterlerneje

Ĉu vi sciis, ke...?

- En la tuta mondo ekzistas inter 6.000 kaj 7.000 lingvoj kun ĉirkaŭ 225 indiĝenaj lingvoj en Eŭropo
- Plej multaj lingvoj de la mondo estas parolataj en Azio kaj Afriko
- Almenaŭ duono de la monda popolo estas du- aŭ plurlingva, t.e. oni parolas aŭ komprenas du aŭ pli da lingvoj
- Dulingveco faciligas la lernadon de kromaj lingvoj kaj plibonigas la penskapablon

Iru al nia retejo por pliaj faktoj!

Por kiuj ĝi estas?

- Lernantoj, studentoj, instruistoj
- Universitatoj, lernejoj, kulturaj kaj lingvaj institutoj
- Organizoj, ...

Fakte por ĈIUJ kiuj volas festi lingvan diversecon en Eŭropo

www.coe.int/EDL



Iru al nia Facebook-paĝo:
facebook.com/ecml.celv



EUROPEAN CENTRE FOR
MODERN LANGUAGES



CENTRE EUROPEEN POUR
LES LANGUES VIVANTES

COUNCIL OF EUROPE



CONSEIL DE L'EUROPE

Festu kun ni la Eŭropan Tagon de Lingvoj je la 26a de septembro!

Kio troveblas en la re- tejo de ETL?

- Kalendaro de eventoj en la tuta mondo kun aktivaĵoj organizitaj por festi la Tagon
- Informoj pri la ETL, ĉi-momente en pli ol dudek lingvoj
- Faktoj kaj ciferoj pri lingvoj
- Materialoj por instruistoj kaj organizantoj de eventoj (kun ekzemploj de ETL-eventoj kaj aktivaĵoj)
- Interretaj ludoj por testi viajn lingvokononajn kaj -kapablojn
- Esprimoj, amuzaj vortoj, falsaj amikoj, plej longaj vortoj, palindromoj, langorompiloj kaj multaj aliaj ekzemploj pri similecoj kaj malsamecoj el la riĉa lingvopejzaĝo de Eŭropo
- Ilo per kiu eblas voĉdoni por la plej originala evento

Kiel mi povas parto- preni en la Tago?

Ĉiuj memboŝtatoj, partneroj kaj individuoj povas organizi aŭ kunorganizi aktivaĵojn kaj rajtas ĉerpi ideojn, materialojn kaj reklamilojn el la ETL-retejo.

KELKAJ IDEOJ

- Organizati eventon kiel lingvokunvenon, feston, turneon, bufedon, ...
- Komenci prilingvan blogon
- Verki e-libron aŭ e-revuon
- Mem krei lingvokvizon por viaj studentoj, lernantoj, najbaroj, amikoj, ...
- Organizati konkurson aŭ ludon pri poŝtkartoj, afiŝoj, videoj, fotoj, verkado aŭ kantado

Diskonigu vian eventon kaj registru ĝin en la datumbazon de la ETL-retejo.

Multaj pliaj ideoj kaj materialoj por instruistoj troveblas en <http://edl.ecml.at/teachshare>.

Kiu kunordigas la Tagon?

La Eŭropan Tagon de Lingvoj kunordigas la Lingvopolitika Departemento de la Konsilio de Eŭropo (Strasburgo) kaj la Eŭropa Centro por Modernaj Lingvoj (Graz) de la Konsilio de Eŭropo.

ETL-on subtenas naciaj kunordigantoj en pli ol kvardek landoj. Ili distribuas promociilojn kaj disfamigas la Tagon.

Fondaĵo www.edukado.net
Katalin Kovats, direktoro
NL-2593 RP Den Haag
Spaarwaterstraat 74
Nederlando
+31648926081
redaktanto@edukado.net
katalin.kovats@gmail.com

